

Ludwig Kimme,
Mia Nordernej'

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho, Nordernej', mi amas vin
El mia tuta kor'.
Insulo mia, ravas min
De l' ondoj la sonor'

De l' maro bru', de l' mevoj kri'
Kaj shtormo-kant' en hhor'!
Surkaje promenadas mi
Kaj ghojas mia kor'.

Saluton, urbo en la mar',
Che l' vasta maro-strand'!
Post shtorm-rezista digo-bar'
Sekura estas land'.

Kaj chiu, kiu devis de
Vi disdeigi sin,
Sopiras kaj esperas, ke
Li ree vidos vin.

*Traduko de la Germana poemo "Mein Norderney" de LUDWIG KIMME (*1907-04-07 - †1984-09-03) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1990.*

MR-238-1 / Arg-597-1203 (2013-01-08 09:36:51)